

John Ellerton,

The day Thou gavest,  
Lord, is ended

1. The day Thou gavest, Lord, is ended,  
The darkness falls at Thy behest;  
To Thee our morning hymns ascended,  
Thy praise shall sanctify our rest.

2. We thank Thee that Thy church, un-  
sleeping,  
While earth rolls onward into light,  
Through all the world her watch is keep-  
ing,  
And rests not now by day or night.

3. As o'er each continent and island  
The dawn leads on another day,  
The voice of prayer is never silent,  
Nor dies the strain of praise away.

4. The sun that bids us rest is waking  
Our brethren 'neath the western sky,  
And hour by hour fresh lips are making  
Thy wondrous doings heard on high.

5. So be it, Lord; Thy throne shall ne-  
ver,  
Like earth's proud empires, pass away:  
Thy kingdom stands, and grows fore-  
ver,  
Till all Thy creatures own Thy sway.

...

John Ellerton,

Ni estis ja en mano  
Dia

*tradukita de Manfredo Ra-  
tislavo*

1. Ni estis ja en mano Dia,  
dum brilis super ni la Sun'.  
Protektu nin per mano Via  
dumnokte, Dio, ankaŭ nun!

2. La ter' cirkulas ĝis la ve-  
no  
de l' nova tag', ripozas ni  
dum tiu nokt' en Via beno<sup>2</sup>  
ĝis la mateno, kara Di'.

3. Nun kiam en malhel' for-  
dronas  
la Sun' en tiu ĉi vesper',  
multvoĉe Via laŭdo sonas  
alialoke sur la Ter'.

4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta  
la Teron lumo de l' maten',  
senĉese estas plusonanta  
preĝado de la homoj jen.

5. Ja estas, Dio ĉiopova,  
senlima Via regno, nin  
konduku al la tago nova  
en Via regno je la fin'!

...

John Ellerton,

Forpasis tiu tag',  
Sinjoro

*tradukita de Frieder Wei-  
gold*

1. Forpasis tiu tag', Sinjo-  
ro,  
Kaj profundiĝas la sen-  
lum'.  
Vi gardis nin de ajn dolo-  
ro.  
Nin gardu ankaŭ dum nok-  
tum'!

2. Ni rotacias en la tagon.  
En nokta paco dormas ni.  
Kaj portas lumon trans la  
maro  
La suno, kie brilas ĝi.

3. Senĉese kiel la mateno  
Briladas super tera rond',  
Eksonas laŭdo pro la beno  
Al ĉiu sur la vasta mond'.

4. La suno, kiu ĵus subiris,  
Ja brilas en plu fora land'!  
La gloron, kiun ni admiris,  
Anoncas plu preĝada  
kant'.

5. Pereas regnoj. Tiel estu!  
Kaj sole staras via tron',  
Ke sole via regno restu  
Je fina tag' sub unu kron'.

...

<sup>2</sup>aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 - †1893-06-15), publikigita 1870.*

*Arg-130-255 (2008-11-08 14:47:39)*

*Information about the author can be found on the website [http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton\\_j.htm](http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton_j.htm).*

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-01-10.*

*Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)*

*Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.*

*Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kantlibro "Gotteslob" (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).*